Bondeziroj de nemalmultaj ambasadejoj indikis la internacian agnoskon por la Esperanto-afero. Ĉeestis la inaŭguron la ambasadoroj de Slovenio (Katja Boh) kaj de Kubo en Aŭstrio; la konsilistoj de la finna kaj franca reprezentejoj; la sekretario de la brazila ambasadejo (cetere, mem kongresano) kaj la aferŝarĝito de Israelo. Skribaj salutoj venis, en Esperanto, de la slovena kaj israela ambasadoroj kaj de la Bjalistoka urbestro: dum la unua akcentis la bezonon esti neŭtrala nur mondpercepte, sed ne inter etiko kaj maletiko, kaj la

dua la komunajn trajtojn de Israelo kaj Esperantujo (ambaŭ parolas konscie kaj plane vivigitan lingvon), la lasta eldiris sian esperon pri la konstruigo de la Esperanto-Centro en la naskiĝ-urbo de Zamenhof.

★

### Bonvenon en Valencio

Miguel Ochoa, la hispana ambasadoro, invitis la kongresanojn al la venontjara UK en Valencio per elokventa parolado, kiun la publiko ŝajnis kompreni eĉ sen interpreto.

Bondezirojn sendis, en la angla lingvo, la Ĉef-ministro de Novzelando, Jim Bolger, kaj la gvidanto de la opozicio en la sama lando, la ambasadoroj de Aŭstralio, Ĉeĥio kaj Grekio, kaj la kultura ataŝeo de Usono.

★

### Parolas la nepo de Zamenhof

Mallonga muzika interludo, prizorgita de s-inoj Galina Staneŝnikova kaj Elena Puhova (fortepiano) kaj Sarah Su Jones (violono) preparis la animojn al la esenca parto, nome al la parolado de la nepo de la kreinto de Esperanto, Ludoviko C. Zaleski Zamenhof (la teksto sube).

Laŭ la tradicio, la Inaŭguro finiĝis per la salutoj de la Landaj Asocioj kaj per komuna kantado de la himno 'La Espero', kiun sekvis tondra aplaŭdo.

Ni dankas al "HEROLDO DE ESPERANTO", el kies frontpaĝo ni ĉerpis tiun-ĉi!

Jen bona novaĵo!:

Ĉiuj tutnovaj abonantoj el landoj kun plena kotizo, kiuj nun pagos abonon al «Heroldo de Esperanto» por 1993, ricevos senpage la lastajn numerojn de 1992 ĝis elĉerpiĝo. La oferto validas ĝis la 31-a de decembro 1992.

Peradas por vi U.F.E.

16 numeroj jare:

144 FF

Mesaĝo de Thomas KLESTIL  
Prezidanto de la  
Aŭstria Federacia Respubliko

*"Ĝuste vi, inter malmultaj aliaj homoj en la mondo, estas aparte sentemaj pri la granda lingvo-problemo, kiu obstaklas la kuniradon de la homaro. Ekde 1989 ni travivis en Eŭropo potencajn leviĝojn. Multaj ideologiaj muroj kaj baroj falis; la doloriga divido de Eŭropo apartenas al la pasinteco. Aliflanke aperis novaj malhelpoj, ja abismoj, kiuj malfaciligas kaj ĝis nun ŝajnas malebligi la kunkreskadon de la Eŭropanoj. Inter tiuj demandoj, la problemoj de interkompreniĝo certe ludas ne malgravan rolon. Al tiu, kiu ne komprenas interparole la alian, estas ankaŭ malfacile malfermiĝi al la "alieco" en la kulturaj, psikaj kaj religiaj kampoj".*





Kia granda evento, kia ĝojo por esperantistoj kaj SAT-anoj kongresi en KAUNAS! Depost 1926 (lasta kongreso en la tiama LENINGRADO) SAT estis malpermesita en Sovetio. Nun estas eble por la Sennacieca Asocio Tutmonda kongresi en Litovio.

Dum 2 semajnoj, de la 5a ĝis la 15a de aŭgusto, la kongreso disvolviĝis en la Litova Agrikultura Akademio. Ĝin organizis la Litova Esperanto-Asocio. Aliĝis 530 gesamideanoj el 30 landoj. La solenan inaŭguron partoprenis pluraj eminentuloj de la litova respubliko, interalie la urbestro de Kaunas, S-r° Arimantas Račkaukas, kiu parolas flue Esperanton! Reprezantantoj de diversaj landoj, interalie novaj respublikoj de eks-Sovetio, salutis la kongresanaron. Dokumentoj rilate la SAT-kongreson de 1926 estis transdonitaj de membro de la Sankt-Peterburga Asocio al la estraro de SAT.

Dum tiuj 2 semajnoj alternis diskutoj, prelegoj, E°-kursoj, buntaj vesperoj kaj ekskursoj. Dum frakciaj kunvenoj kaj prelegoj estis traktataj temoj kiaj ekologio, neperforto, ekonomio. Dum la ĝeneralaj kunsidoj oni diskutis pri naciismo. La kongreso esprimis sian solidarecon kun la streboj de ĉiuj popoloj al memdecido pri siaj aferoj, malkvietis pro rasismo kaj ŝovinismo, kaj konstatis, ke la merkatekonomio povas havi negativajn konsekvencojn.

Okazis paroligaj kaj perfektigaj kursoj diversgradaj, kaj prelegoj pri instruado de Esperanto, kun modellecionoj. En la vesperaj spektakloj partoprenis ĉefe rusaj artemuloj. Surpodiumis ankaŭ la pola aktoro Jerzy Fornal.

La ekskursoj ebligis al la gekongresanoj malkovri nekonatan sendependan Litovion... Perŝipa ekskurso laŭ la rivero Neman ĝis urbo Nida, apud la Balta Maro, al la malnova kastelo Trakai kaj al la ĉefurbo VILNIUS, finfine al la etnografia muzeo Rumšiškės.

Ĉiutage aperis la "Kongresvoĉo", kiu informis pri la okazantaĵoj.

En 1993, la SAT-kongreso okazos en **Bulgario**.

Catherine ROUX kaj Jacqueline LEPEIX

\*\*\*\*\*

## "...JES! MI PARTOPRENIS LA VIENAN KONGRESON!"

Post unu semajna veturado tra Eŭropo, ĉe miaj ĉarmaj korespondantinoj, kiuj akceptis min tre fervorege, mi alvenis Vienon preskaŭ sen problemoj. Mi tamen devas konfesi, ke nur rompita el-las-tubo ne revenis kun mia filo kaj mi!

Jen venis la unua tago de la 77a Universala Kongreso (U.K°) en Vieno. Eŭropa ĉefurbo de internacia dialogo, la urbo regalis min.

En la kongresejo ("Austria Center") ni povis renkonti 168 Francojn kaj Luksemburganojn inter 3033 ĉeestintoj el 69 landoj...

"La plej granda U.K° en Okcidento post la dua mondmilito", tiel karakteriziĝis la tuta semajno. Dum la solena inaŭguro okazinta en la impona salonego "Zamenhof", la proksimuma 2500-kapa ĉeestantaro, ĉi-minute, spertis la modifiĝon de la eŭropa realaĵo, kiu ne povis ne influĝi nian esperantan scenon.

Esenca kaj plej pensiga parto de la solenaĵo: la parolado de L.C. Zaleski-Zamenhof, nepo de "Dr° ESPERANTO". Ĝi pruvis la aktualecon de la "interna ideo", kiu siatempe inspiris la kreinton de nia lingvo. Ni citu kelkajn erojn de tiu festparolado:



77a

KON  
GRESO

DE UNI  
VERS  
ALA

ESPER  
ANTO

ASO  
CIO

"La ĉefa fonto de miaj hodiaŭaj vortoj estas la "Preĝo sub la verda standardo"... , prezentita al la unua el viaj Universalaj kongresoj en Bulonjo-ĉe-Mar (Francio). ... "Preĝante sub la verda standardo vi ĵuris labori por reunigi la homaron. La komuna Eŭropa Domo estu do domo sen apartigaj muroj, nek internaj, nek periferaj. Ni tien ne venu kun dogmoj de blinda fervoro! Ni laboru, ni, la Esperantoj, por ke tiu domo fariĝu ero en la domaro de la granda rondo familia".

... Por la bona interkompreno de la homoj formantaj tian unuiĝon, por la bona interkompreno de la homoj apartenantaj al malsamaj unuiĝoj sur nia terĝlobo, ni daŭrigu proponadi la servojn de la neŭtrala Internacia lingvo. Ni esperu ke ĝiaj centjaraj sperto kaj juneco konvinkos milionojn da uzantoj, tiel faciligante la **efekti-viĝon de la bela sonĝo de la homaro**"... (*fino de la cito*).

En Karlsplatz, en la urbocentro, okazis inaŭguro de E°-Parko, la 25an de julio. Tien oni translokis la Zamenhof-buston, kiu depost la jaro 1958 troviĝis aliloke. La solenaĵon partoprenis centoj da personoj.

London vespere la ĉefsalono de la kongresejo estis invadita de gedancemuloj, kiuj plenprofitis la vere vervan muzikadon de la danc-orkestro Bigbanda el Linz. Tiu evento arigis preskaŭ 1000 gekongresanojn! Je ĝenerala bedaŭro, jam noktmeze devis finiĝi la balo! Poste, tago post tago, okazis multaj spektakloj, kiuj ebligis aplaŭdi artistojn (ofte ne...-istojn), dum klasikaj teatraĵoj, pupteatraĵoj, koncertoj de klasika muziko... Kantistinoj unuopuloj, elstaris pluraj korusoj -ni emfazis pri la nova sukceso de la internacia "kantistaro", kiu interpretis sub la gvidado de Dimitr Terzjev la "Belan Bluan Danubon"-Ankaŭ por nia ega plezuro serĉis la fama "Fraŭlino Barlaston", kiu estas -laŭdire!...- intima

amikino de "Ŝia Moŝta Reĝino Elizabeta".. Bedaŭrinde la rokmuzikgrupo "Amplifiki" ne ĉeestis kiel antaŭvidite.

Intertempe, kiam ni ne partoprenis konferencojn, ne spektis surscenajn vidindaĵojn, aŭ.. aŭ .. ni povis kuraĝe viziti la urbon, kies mirindaĵoj plenplenigis okulojn, orelojn, koro(j)n... Infanoj -kaj ceteruloj- frandis ĉiujn amuzstandojn de la Prater-Parko, interalie la "Gigant-Radon"... Eblis viziti la Muzeon de la Belartoj, muzeon de la horloĝoj, la Palacon Hofburg (sidejo de la Internacia E°-Muzeo). Ne malmultaj ĝuis promenadon tra la Kastelo Schönbrunn, iama rezidejo de la imperiestrino "Sisi".

Ĉar la vetero agrable "revarmigis" nin, gastigis nin antaŭkafejoj, kie ni ĝuis ne nur la etoson sed ankaŭ la apudajn strat-spektaklojn...

Fakte mi forgesos nenion sed mankas al mi sufiĉa loko por prirakonti ĉion, kion mi vidis! Senĉese estis io farenda, nur la nokto estis tro mallonga...

Do, en la okazo se ĉi-tiu ferio-vivmaniero plaĉus ankaŭ al vi, eksciu, ke en VALENCIA (Hispanio) okazos la venonta U.K°. Vi flugos al SEULO por partopreni tiun de 1994!

Mi ne forgesu danki al la "Danuba Kuriero", punkta kongres-gazeto, kiu ebligis al mi ĉerpi iom da etoso dum la verkado de mia raporto...

Vito (54-Frouard)

\*\*\*\*\*



POUR UN ESPERANTISTE  
LA "JOURNEE DU LIVRE"  
DURE TOUTE L'ANNEE!

LIBRO-SERVO  
12, Rue E. d'Orves  
F-54490 PIENNES

Kio estas Esperantisto, kiu nek aĉetas librojn kaj nek legas? Jes, kia esperantisto li estas?

Via libro-servo proponas al vi kelkajn novaĵojn

uz-modo :

Simpla mendo-poŝtkarto.  
Baldaŭa libropakaĵo  
kun interna fakturo via  
kaj danko anticipa  
pro via pago tuja!

Nian novan libro-katalogon vi malkovros en ĉi-tiu n° de "La Informilo". Bonvolu forpreni la koncernatajn paĝojn kaj faldi ilin laŭ la malgranda mediano.

- = **Nova Esperanta Krestomatio** - Redaktis William AULD - 509 paĝoj 171 FF  
"Konciza, tamen ampleksa panoramo de la Esperanta literatura aktiveco post unu jarcento de ekzisto de la lingvo... Bona deir-punkto kaj serioza bazo por progresinto, kiu deziras bone alproprigi ne nur la lingvon sed ankaŭ la idearon de Esperanto" diras **Franca Esperantisto**.
- = **Metodiko de la Esperanto-Instruado** - Rudolf RAKUŠA - 189 paĝoj 50 FF  
Pritrakto de profesi-nivela didakto en 9 ĉapitroj, de humanecaj ecoj de E°-instruado ĝis liberaj aktivaĵoj de infanoj, krom la konataj metodikaj temoj. Tria eldono de la plej funda kaj detala gvidilo pri "instru-arto" de E°.
- = **"Winnie-La-Pu"** de A.A. MILNE, laŭ traduko de K. Reed / R. Levin 80 FF  
Mondfama infan-klasikaĵo pri la knabo Kristoforo Robin, la urso Winnie-la-Pu kaj aliaj bestoj-amikoj. Ilustraĵoj de Ernest H. Shepard. El la originala, angla eldono. kun anglalingva enkonduko, kaj vortolisto de H. Tonkin.

Roger DEGRELLE

\*\*\*\*\*



Ekzamenoj en Nancy

Okazis 2 ekzamenoj de "Atesto pri Lernado", la merkredon 17an de junio por la "vesperaj" gelernantoj, kaj la sabaton 20an por staĝanoj kaj perkorespondaj lernantoj. Ĉar okazis antaŭe provekzameno pere de la tekstoj de la pasinta jaro, ĉiuj, kiuj trapasis la ekzamenon, sukcesis (entute 8 personoj). La sukcesintoj, **kiujn oni gratulu**, estas:

- |   |  |
|---|--|
| - S-r° Robert <b>ESCRIOU</b> , 55300 SAINT-MIHIEL | - D-r° Gérard <b>PATUREAUX</b> , 57038 JURY-les-METZ |
| - S-r° Eric <b>GUEUSQUIN</b> , 57580 VATIMONT     | - S-in° Odette <b>ROUGIEUX</b> , 54710 LUDRES        |
| - S-r° bruno <b>HENRY</b> , 57100 THIONVILLE      | - S-r° André <b>TOUCHET</b> , 54140 JARVILLE         |
| - S-in° Betty <b>MOUREAUX</b> , 54000 NANCY       | - F-in° Laurence <b>VIRY</b> , 88250 LA BRESSE       |

"Franca Esperanto-Instituto" ne plu donas eventualajn citojn por la sukcesintoj. Tion mi-mem tre bedaŭras, tial mi emas citi... S-r°n Escriou (93 poentoj el 100), S-r°n Gueusquin (87|100), D-r°n Patureaux (86|100). La aliaj ricevis iom malpli da poentoj, sed ne sub 63|100! Do entute sukcesa ekzameno, kaj refoje gratulojn!

Rekomencigo de la agado en Nancy

J.-P. COLNOT

La unua laborkunveno okazos la merkredon 23an de septembro je la 19a. Tiam ĉiuj ĉeestantoj ricevos disdonotajn flugfoliojn pri E°, kaj novajn afiŝojn (kiujn afable konsentis financi "La Poŝto"). Decidoj pri la venontaj kursoj estos definitivaj nur post la kunveno, sed oni jam povas antaŭvidi: kurson por **komencantoj**, merkrede je la 19a horo, ek de la 7a de oktobro, kurson **2a-gradan** dufoje monate, la ĵaŭdon je la 19a, plus alterne kunveno por konversacio aŭ kanto, aŭ **3a-grada** (alterne kun la 2a-grada). Ni provos funkciigi sabatan staĝon, sed ne eblas scii ĝis nun ĉu por la, 2a aŭ 3a grado: la 2 unuaj gradoj kolektis nur po duon-dek-duon da interesatoj, la 3a nur 3...

Perkoresponda kurso

Ni finis la lastan lernjaron kun nur 15 gelernantoj, sed la rezultoj estas kontentigaj ĉar el ili, 5 jam atingis la finon de "M° 11". Mi citis 3 en la lasta "Informilo", de post tiam finlernis ankaŭ: S-in° odette DEROBE, en 54670 MILLERY (gvidita de S-r° Greiner), S-in° Janine COLIN en 54500 VANDOEUVRE (gvidita de F-in° Roux). Gratulojn!

Novaj kotizoj de la Perkoresponda Kurso: Por komencantoj, ĝi estas nun **265 F** kun la libro, laborslipoj kaj kasedo (210 F sen kasedo). por la 2a grado, **140 F** (plus libro 63 F, plus kasedo 70 F, ĉio afrankite).

Flugfolioj, cirkuleroj kaj afiŝoj estas je la dispono de ĉiuj, kiuj deziras informi pri la kurso.

J.-P. C.

Nova prospekto -en Esperanto!- pri Nancy

Nova kolora prospekto do aperis, kiel anoncote en la lasta "I°". Bonvolu peti ĝin skribante al:

TURISMA OFICEJO

14, Place Stanislas, F-54000 NANCY

Ĝi estas senpaga. La aludita T.O. estas kontenta pri la ĝisnuna rezulto; jam venis nombro da petoj sed kvazaŭ ne el nia regiono. Tiu inform-prospekto aperis precize la 15a de julio. Bedaŭrinde la 1a paĝo restis sensanĝa... kun franca teksto "Nancy historique"... sed ĉiuj aliaj paĝoj estas en Esperanto!

\*\*\*\*\*



**NANCY**  
*une ville de style*  
OFFICE DE TOURISME DE NANCY

J'aimerais vous entendre par téléphone à ce sujet, si toutefois vous étiez disponible.

Nous recevons depuis quelque temps des demandes de documents en espéranto; votre initiative et votre implication se trouvant récompensés.

Au nom de l'Office de Tourisme, et de la ville de Nancy, je vous adresse mes remerciements. J'espère que ces demandes seront suivies d'autres à l'avenir.


Dans l'attente du plaisir de vous revoir, je vous prie de croire, Cher Monsieur, en l'expression de mes sentiments les meilleurs.

N° ref  
Nancy e 14 AOUT 1992

Monsieur COLNOT  
M.J.C. PH. DESFORGES  
27, rue de la République  
54000 NANCY

Cher Monsieur,


Je reçois ce courrier d'Albanie où vos amis espérantistes ont, semble-t-il, apprécié le document "Nancy historique", nouvelle édition.

  
Claudine CAMILLE  
Directeur Adjoint

Sarlanda Esperanto-Ligo r.a.  
 Querstr. 11, DW-6607 QUIERSCHIED  
 Tel.: 06897-62142

= 40a KULTURA SEMAJNFINO =


4an de decembro / 6an de decembro 1992



# HOMBURG-SAAR

Kardinal-Wendel-Haus  
 Kardinal-Wendel-Straße

DW-6650 HOMBURG/Saar  
 Tel.: 06841 4181



----- aliĝilo -----

por la 40a Kultura Semajnfino

— 1992 /12/04— 1992 /12/06—

- 1 - mi partoprenas kurson a  b  b2  c
- 2 - mi volas tranokti kaj matenmanĝi en la domo: 04  05
- 3 - mi partoprenos jenajn manĝojn: (en 1-lita ĉambro  )  
 vespermanĝo vendrede  tagmanĝo sabate   
 vespermanĝo sabate  tagmanĝo dimanĉe
- 4 - mi mendas jenajn librojn: **Wir lernen Esperanto** (18 DM)   
**Vole... Novele** (Schwartz) (24 DM)   
**Kun siaspeca spico** (Schwartz) (27 DM)
- 5 - la aliĝkotizon de 25 DM (membroj de SEL: 15 DM)  
 mi pagas samtempe   
 sen aliĝkotizo
- 6 - Nomo kaj antaŭnomo:  
 Adreso:

validan bonvolu  
 kruc-streki

Dato:                      Subskribo



La staĝejo estas facile atingebla:

trajne: linio Saarbrücken-Ludwigshafen.  
 de la stacidomo: fervoja buso  
 al direkto Zweibrücken, forlasi  
 la buson ĉe haltejo "Birkensiedlung"  
 poste, kelkminuta piediro.

aŭte: aŭto-ŝoseo Saarbrücken-Mannheim  
 eliro: Homburg.  
 poste, strato b 423 al direkto Zweibrücken-  
 atentu pri vojmontriloj! Rande de la urbo turniĝu  
 al "Neue Industriestraße" (dekstren) kaj iom poste, maldekstren  
 al "Kardinal-Wendel-Straße".



bonvolu sendi ĉi-tiun aliĝilon  
al

**Sarlanda Esperanto-Ligo**  
Querstr. 11,  
DW - 6607 QUIERSCHIED

**pri la kurs-libroj:**

Ni atentigas la francajn partoprenontojn (ni esperas, ke ili multnombros!...), ke la bezonotaj libroj por la kursoj **b1** kaj **b2** estas facile akireblaj ĉe nia federacia libro-servo:

Libro-Servo  
12, Rue E. d'Orves  
54490 PIENNES

- okazos jenaj kursoj kaj prelegoj:
  - a por komencantoj:** lernolibro: "Wir lernen Esperanto"  
kursestro: Karl BÜRGER (D)
  - b1 por progresantoj:** legolibro: "Vole... Novele"  
kursestro: Kreŝimir BARKOVIĈ (F)
  - b2 por lingvaj spertuloj:** legolibro: "Kun siaspeca spico"  
kursestro: Eddy BORSBOOM (NL)
  - c por esperanto-parolantoj:** seminario: gvidos ĝin Eŭgeno KOVTONJUK (Ukraino) - temo: Esperanto en la teritorio de la iama Sovet-Unio;
- pri aparta porinfana programo zorgos Takajo WALZ (D)
- tranokto en unu- kaj trilitaj ĉambroj
- plena pensiono kostos **50 DM por unu tago**
- ĉi-kuna aliĝilo resendenda ĝis la aliĝkotizo (PCK° Saarbrücken 5358-663 )
- gejunuloj ĝis 26j. kaj gestudentoj **ne** pagas aliĝkotizon



**PROGRAMO**


<p><b>04</b> - vendredo 17h. alveno 18h30 vespermanĝo poste... konversacia vespero</p> <hr/> <p><b>05</b> - sabato 8h30/9h. matenmanĝo 9h/10h. laborkunsido (por SEL-membroj) 10h/12h. ekskurso 12h30/14h. tagmanĝo ... ĝis la 14a: alveno de ĉiuj partoprenantoj 14h30/16h. kursoj kaj seminario 16h/16h30 posttagmeza kafo</p>	<p>16h30/18h. kursoj kaj semin. 18h30/19h15 vespermanĝo 19h30/20h15 diservo poste... <b>Muzika vespero</b> *</p> <hr/> <p><b>06</b> - dimanĉo 8h/9h. matenmanĝo 9h/10h30 kursoj kaj semin. 10h30/11h paŭzo 11h/12h kursoj kaj semin. 12h/12h30 aperitivo 12h30/14h tagmanĝo poste... <b>forveturo</b></p>
--	---

\* *Saskia VEEN ludos harpon*

\*\*\*\*\*

17	P Vivo estas pli forta (la)	Leser	37,00
	R Vivi estas dangere	I. Nemere	70,00
	D Vojaĝo al disiĝo	Štimec	40,00
	F Vojaĝo al faremido	Frigyes-Karinty	38,00
	R Vojaĝo al Kazohinio	Szathmari	61,00
	R Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas	Manjo Austin	54,00
	G Vojaĝo tra Cinio	C.E.E.	105,00
	N Vole Novele	Schwartz	71,00
	V Vortaro de esperantaj rimoj		22,00
	D Vortoj de Andreo Cseh		72,00
	D Vortoj de kamarado Lanti		15,00
	E Vort-statistikaj esploroj	Vatré	18,00
	E Vort-teorio en Esperanto	De Saussure	39,00
	-*-		
	B Zamenhof ( bildrakonte )	Disano Derzette	35,00
	Bi Zamenhof	Marjorie B lton	108,00

# Libro-Servo



## de la Orientfranca Kultura Esperanto-Federacio

(junio 1992)

=== \*\*\*\* === \*\*\*\* === \*\*\*\* === \*\*\*\* === \*\*\*\* === \*\*\*\* ===

### KIEL AĈETI PERKORESPONDE?



1°/ Vi sendas vian mendon al la ĉi-suba adreso:

#### LIBRO-SERVO

12, Rue Estienne D'Orves  
F-54490 PIENNES

2°/ Vi baldaŭ ricevos la menditajn librojn kun fakturo (prezo de la libroj + sendkostoj)

3°/ Vi tuj pagos per poŝtgiro aŭ mandato al:

LIBRO-SERVO CCP 2800-76 H NANCY  
aŭ per bankoĉeko al LIBRO-SERVO

=== \*\*\* ===

La Federacio disponigas al siaj membroj gravan specifan libro-servon, kiu ampleksas multajn librojn, kies liston ni proponas al vi en ĉi-tiu katalogo.

Ili estas aĉeteblaj en ĉiu kongreso, staĝo aŭ faka evento organizita de la Federacio. Ilin oni povas ankaŭ mendi perkoresponde.

(la prezoj indikitaj povos iomete ŝanĝiĝi)

La libro-servo cetere faras sian eblon por havigi al iu petanto verkaĵon, kasedon, diskon, ktp, kiuj aperas ĉe iuj ajn E°-eldonistoj.

\*\*\*\*\*

#### KLARIGOJ

B: bildstrio	Fz: filozofio	P: poezio
Bi: biografio	G: geografio	R: romanoj
D: diversaĵoj	H: historio	Rg: religio
E: e°-movado, lingvaj studoj	I: infanlibro	S: scienco, tekniko
F: fabloj, fabeloj	N: noveloj, rakontoj	T: teatraĵoj
V: vortaroj, lernolibroj, legolibroj		

TITOLO	VERKISTO	PREZO(FRF)
V Abrégé pratique de grammaire	Lentaigne	7,00
E Aktoj de la akademio (1963-1967)	U.E.A.-S.A.T.	18,00
E Aktoj de la akademio (1968-1974)	U.E.A.-S.A.T.	30,00
E Aktuala metodo de Esperanto	Mattos	49,00
E Akuzativo	Moirand	100,00
P Al abelujo ĝi flugas	LIIV	15,00
Alia pasinteco (la)	Rico Belthuis	15,00
R Alta akvo (la)	I. Nemere	46,00
T Amo de Danto (la)	Trygve-Muller	38,00
N Amuleto (la)	Meyer	39,00
V Amuza legolibro	Lienhardt	45,00
S Amuza matematiko por gelernantoj	Arnaudov	30,00
S Amuzo per scienco	Charles Vivian	25,00
D Angla antologio (1000-1800)	Aùld	40,00
N Antologio de portugaliaj rakontoj		20,00
P Angoro	Piĉ	73,00
P Apenaù bukedeto	Bernard	45,00
R Aùli - Rakonto pri knabeto	Adamson	42,00
D Aùstralia antologio	Towsey	220,00
N Aventuroj de Kajĉjo (la)	M. Kownacka	70,00
N Aventuroj de lia Moŝto.. (la)		37,00
R Aventuroj de Spar ...	De Roover	35,00
N Avo-Fungo	L. Claudel	30,00

## Avo-Fungo kaj aliaj rakontoj

8 originalaj rakontoj de nia samideano  
Jean-Louis CLAUDEL.

Malicaj buboj petolas tra la voĝeza kam-  
paro, dum la pliaĝuloj foje ŝerĉe, foje mal-  
ĝoje, vivas sian vivon en epoko, kiam la mo-  
derno ankoraŭ ne tro modernis!

33 paĝoj da spriteco kaj nostalgio.

Unu ekzemplero	30 FF
Inter 3 kaj 10 ekz.	20 FF
Pli ol 10 ekz.	17 FF

eldonis

Orientfranca Kultura E°-Federacio

P Streĉita kordo	Kalocsay	63,00
E Studoj pri la esperanta-literaturo	Benzcik	59,00
R Sub cirkotendo	Stan Rubenic	60,00
P Sub la signo de socia muzo	Aùld	65,00
E Sub la signo de la verda stelo	Aabyhoj	29,00
P Sub stelo rigida	Porsteinn	24,00
R Suferoj de la juna Verther	Goethe	117,00
N Suno kaj pluvo	Gudrun Riisberg	34,00
R Sur kampo granita	I. Nemere	46,00
P Sur la sojlo de la amo	Marketa	31,00
N Sveda novelaro	Opo	35,00
P Taglibro	Goethe	25,00
D Tajĝiĉjùn	C.E.E.	17,00
R Tero de la homoj	Saint-Exupery	108,00
R Terra	I. Nemere	55,00
V Tiel diru !	Lentaigne	25,00
B Tinĉjo : la krabo kun oraj pinĉiloj	Hergé	50,00
R Tiu toskana septembro	Tavanti-Erte	58,00
Bi Toltoj (leo)	Lebrun	135,00
N Tonio Kruger	Thomas Mann	47,00
R Tra dezerto kaj praarbaro	Sienkiewicz	81,00
P Tra l'silento	E. Privat	23,00
E Tradukarto pri Esperanto	de Diego	23,00
T Tragedio de l'homo (la)	Madàch	45,00
F Trans la fabeloceano	Szilagyl	51,00
H Tria mondmilito (la)	Wlady.Biernaki	50,00
D Tria rapsodio	Szilagyl	10,00
N 33 rakontoj	Stafeto	135,00
R Trigroŝa romano	Brecht	72,00
N Tri noveloj	Eichendorf	81,00
D Tri'stas tro	Beverling	20,00
P Trofeoj (la)	Heredis	36,00
R Turo de Londono (la)	Sooseki	8,00
P Tutmonda sonoro	Kalocsay	198,00
D Uang guj kaj Li Sjang Sjang	Liĝji	19,00
V Universala legolibro	Fricke	14,00
N Unu tago post la alia	Guglielminetti	108,00
Fz Unueco en diverseco	O.P.Ghai	41,00
P Urbo de terura nokto (la)	Thomson	18,00
R Urd Hadda murdita	Dorval	80,00
N Vagado sub palmoj	Ribillard	18,00
R Varsovio 1887	Lopez-Luna	12,00
D Verda relo (la)		67,00
P Verdkata testamento	Schwartz	38,00
D Vereco-distro-stilo	Aùld	65,00
D Verkoj de Verda Majo	C.E.E.	69,00
P Verso kaj larmo	Urbanova	38,00
V Vibraj momentoj	Rosbach	58,00
N Virineto en bluo (la)	Mason Stuttard	66,00
P Vivendo	Gabrielli	52,00
Bi Vivo de Lanti	Borsboom	60,00
Bi Vivo de Zamenhof	Privat	56,00





19  
LA RONKANLA AVO

André Weckmunn

*Avo Klazen retrovas vivenergion dank' al  
brua aro da infanoj, kiuj postulas vivindan  
vivon ... en griza industri-urbo...*

*La rakonto celas kaj infanojn... kaj ge-  
patrojn!*

*Ĉiu el la sep bele ilustritaj ĉapitroj  
aparte taŭgas kiel paroligitaj dum semajn-  
finaj staĝoj aŭ vesperaj konversaciaj kur-  
soj.*

Tradukis el la germana Edmond LUDWIG  
Ilustris Pierre LATASTE

Unu ekzemplero	25 FF
Inter 3 kaj 10 ekz.	16 FF
Pli ol 10 ekz.	14 FF

eldonis

Orientfranca Kultura E°-Federacio

N Saĝo sako	Fan Yizu	10,00
R Salale	Topan-Hussein	80,00
Rg Sankta biblio (1a)		85,00
Bi Schramm (Alber)		36,00
S Sciencaj komunikaĵoj : 1982		16,00
S Sciencaj komunikaĵoj : tekniko	S.E.C.	24,00
S Sciencaj komunikaĵoj : Ter-sciencoj	S.E.C.	24,00
T Sen eliro : la respektama p.	Sartre	20,00
R Senlingvulo (1a)	Korolenko	43,00
R Septaga murdenigmo (1a)	Gates	35,00
S Serĉado de la vivo (1a)	Fujio Egami	41,00
R Serĉu mian sonĝon	I. Nemere	55,00
E Sesdek jaroj kun aliaj konsideroj	Rizzo	18,00
D Sesdekoka : ĉu decida jaro ?	Silfer	18,00
N Sfinkso de steplando (1a)	Glazunov	43,00
R Sinjoro Jokasto ( Maupassant )	Luez	37,00
D Skiza historio de la Utao	Miyamoto	46,00
E Skizo de E° movado en Liono	Vedrine	15,00
R Sklavoj de Dio	Gardonyi	35,00
V Skolta kaj tenduma terminaro	S.E.L.	12,00
D Socia romano en esperanto (1a)	Vatre	15,00
P Soifo	Tarkony	45,00
F Soleco	Catala	90,00
P Somera sinfonio	Leenhard	21,00
R Somermeze	Kuusberg	41,00
P Sonetoj	Under	20,00
P Sonetoj (1a)	Shakespeare	120,00

-\*-

N Bagatelaro	Rosbach	34,00
R Bagasejo (1a)	Almeida-Mattos	45,00
N Bakŝis	Newell	73,00
P Baladoj el Asante	Latham	18,00
R Bapto de caro Vladimir	Tomas Pumpr	90,00
R Batalo de l'vivo (1a)	Dickens	54,00
V Baza Cseh kurso	Int.E°-Inst.	72,00
D Beletro sed ne el katedro(2a eld.)	Waringhien	100,00
N Bestoj kaj homoj	Bernard Golden	81,00
D Bibliografio de la publikaĵoj	Haupenthal	10,00
R Blinda birdo (1a)	J. Nemere	45,00
P Blinda ermito	Caprile	27,00
R Bodil kaj la bando	Hansen	45,00
D Bona sinjorino	Orzeszko	5,00
E Bona lingvo ( 1a )	Piron	42,00
R Boule de suif	Maupassant	54,00
T Brand	Ibsen	63,00
T Bronza tigro	Guo Moĵuo	44,00
N Bulgaraj rakontoj	Ivan Minĉev	5,00
D Bukedoal vi		10,00

-\*-

P Cent ĝojkantoj	Boulton	23,00
D Centa simio (1a)	Ken	20,00
N Ĉiela birdo (1a)	Zsigmond Morioz	24,00
D Ĉinaj familiaj pladoj	Liu cajšeng	14,00
E ĉiu ĉiun	Teo Jung	108,00
R ĉu li bremsis sufiĉe ?	Valano	36,00
R ĉu li venis trakosme ?	Valano	67,00
R ĉu ni kunvenis vane ?	Valano	70,00
R ĉu rakonti novele ?	Valano	55,00
R ĉu ŝi mortu tra-fike ?	Balano	50,00
R ĉu vi aŭdis tion ?	Grenkamp	6,00

-\*-

D Danco ĉirkaŭ lokomobilo	Mats Traat	28,00
R Dankon amiko	Claude Piron	28,00
E Dek prelegoj	Kaloksay	40,00
Bi De paĝo al paĝo	Tarkony	36,00
V Decimala katalogo de la planlingva literaturo	u.k. en Lublin	45,00
E Deveno de Esperanto (1a)	Mattos	49,00
V Dictionnaire pratique d'E°	S.A.T.	80,00
R Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ	Holst	32,00
D Diskriminacio	Opo	59,00
Fz Diskurso pri la metodo	Kartezio	39,00
P Divershumore	Rejna de Jong	31,00
Bi Doktoro Esperanto (bindita)	Ziolkowska	25,00
R Doktoro Jekyll kaj S-ro Hyde	Stevenson	57,00
E Doktoro kaj lingvo Esperanto	Holzhaus	180,00
P Doloro (1a)	Ungaretti	24,00
T Don Juan Tenorio	Zorrilla	72,00
N Drolaj rakontoj	Balzac	102,00
N Du amasantaj noveloj	Storm-Escherich	8,00
P Du el	Boulton	89,00

P Dudek kvar sonetoj (la)	Louise Labe	37,00
D 25 jaroj	Aùld	42,00
P Duonvoĉe	Maura	45,00
--		
V Ek-Vortaro de matematikaj terminoj	Hilgers	71,00
P Ekzilo kaj azilo	Emba	28,00
P El ĉina poezio	S.J. Zee	44,00
F Elektitaj fabeloj	Grimm	80,00
F Elektitaj fabloj	Krilov	63,00
E Elektitaj paroladoj kaj prelegoj	Lapenna	90,00
D Elektitaj satiroj	Kiŝon Efraim	50,00
D Elingita glavo		27,00
P Elpafu la sagon	Sekelj	81,00
N El la maniko	Reto Rossetti	90,00
P El Parnaso de popoloj	Grabowski	100,00
P El streĉita kordo	Kalocsay	10,00
P El tero kaj etero	Pioro	24,00
P En barko senpilota	Aùld	243,00
E Enciklopedio de Esperanto	Kokeny Bleier	122,00
D Enkonduko al literatura kritiko	S.U.K. Liège	50,00
Fz Enkonduko en la kategorion de Aristotelo	Porfirio	27,00
D Enkonduko en la Libroskiencon de E°	Hauptental	13,00
T En maskobalo	Baghy	39,00
P En senvoja sovaĝejo	Jacob Maris	24,00
T Epifanio	Shakespeare	32,00
P Esperanta antologio	Aùld	180,00
B Esperanto ( en la franca )	Tilleux-Bisano	35,00
V Esperanto : bildvortaro	Eichholz	260,00
E Esperanto el la vidpunkto de	C. Piron	15,00
E Esperanto en perspektivo	Lapenna	230,00
E Esperanto : lerneja eksperimento	Sonnabend	36,00
Rg Esperanta meslibreto	I.K.U.E.	5,00
E Esperanto novelarto	Rossetti-Vatré	180,00
E Esperantologiaj studoj	Wurster	72,00
E Esperantologio kaj ties disciplinoj	Neegard	18,00
E Esperantonimoj	Givoje	24,00
I Eta princo (la)	Saint-Exupery	80,00
N Etaj rakontoj	Novembro	15,00
E Eterna neologisma diskuto (la)	Krammer	24,00
Rg Eta sabat-dimanĉa breviero	Opo	60,00
--		
F Fabloj de Lessing	Lessing	30,00
V Facilaj dialogoj		45,00
P Fajro sur mia lango	Derock	27,00
R Fajron sentas mi interne	Mathias	47,00
V Faktoj kaj fantazioj	Boulton	108,00
V Falsaj amikoj en esperanto	Ribot-Bernard	7,00
B Faraono (la)	Prus	17,00
T Fatomaŝino (la)	Kokto	45,00
V Faux amis-faux parents étrangers	Lentaigne	15,00
I Feliĉa birdo	C.E.E.	10,00
N Fenestro kristala	Pioro	86,00
P Fenikso tro ofta	Fry-Aùld	15,00

V Paŝoj al plena posedo	Aùld	63,00
R Patroj kaj filoj	Turgueniev	43,00
P Pendumilaj lidoj	Morgenŝterno	52,00
S Per komputila tekstoprilaboro	Koutny	90,00
I Pipi strumpolonga	Astrid Lindgrein	96,00
V Plena analiza gramatiko	U.E.A.	144,00
V Plena ilustrita vortaro(5a eldono)	Opo	420,00
P.I.V. suplemento al 1-a eldono	Opo	30,00
V Plena vortaro	Opo	90,00
N Pli ol fantazio	Bogh-Hogsted	21,00
I Plupo en la grandarbaro	Ingo Borg	33,00
I Plupo kaj la lupoj	Ingo Borg	33,00
I Plupo kaj la maroj	Ingo Borg	33,00
I Plupo kaj la grupoj	Ingo Borg	33,00
I Plupo kaj la ursidoj	Ingo Borg	33,00
P Poemoj	Matkowski	20,00
D Poeto fajrakora	Boulton	118,00
P Poezia arto (la)	B. Ragnarsson	23,00
V Por la praktikantoj	Babin	30,00
V Poŝvortaro	Opo	18,00
V Praktika bildvortaro	langage services	30,00
P Pretertempe	De Giorgi	54,00
Fz Pri dubo kaj certeco	Paùli	39,00
E Pri internacia lingvo dum jarcentoj	Drawter	90,00
E Pri lingvo kaj aliaj artoj	Aùld	54,00
E Pri literatura kritiko	De Diego	53,00
E Pri problemo de internacieco de scienc-teknika terminaro	Drezen	54,00
P Primico	Tagore	31,00
D Pri sennaciismo	Lanti	6,00
Bi Profetino H Konttinen	Sarlin	22,00
P Prologo	Chaucer	12,00
P Prologo	Miñalski	10,00
--		
R Rabeno de Baŝaraŝ (la)	Heine-Zamenhof	14,00
R Rabeno de Baŝaraŝ (la)	Heine-Hauptenthal	30,00
S Radioteknika artikolaro	S.E.C.	20,00
N Rakontoj de Oogai	Mori	51,00
V Rakontu samideano	Opo	34,00
R Regulus	Lorjak	97,00
Fz Rekta pensado	Paùli	39,00
P Renesanca periodo (la)	Opo	68,00
E Resumo de la teorio de Antido	De Saussure	34,00
N Reto (la)	Bukar	6,00
S Retoriko	Lapenna	135,00
P Robaĵoj	Kajam/Aùld	45,00
P Robaĵoj	Kajam/Waringhien	36,00
I Ronkanta avo (la)	André Weckau	25,00
R Roseanna	Sjõwall	80,00
D Roseroj		19,00
R Rozinjo	Gyula-Tôrök	27,00

21 V Metodo 11	
V Metodo 15	
R Metropoliteno	
R Mia vivo	
E 1887 kaj la sekvo(2a eldono)	
R Misio sen alveno	
R Mistero minora	
N Moderna kroatia prozo	
S Molekuloj	
P Mondo kaj koro	
R Montara vilaĝo	
R Monto (la)	
I Morso-klubo	
T Mortinta reĝino (la)	
P Morto de la ĉielarko (la)	
R Mortsonoriloj de Chamblay (la)	
R Murdo en Esperantujo	
--	
Najbaroj kaj boraj	
V Naturalismo kaj skemismo	
R Nekonata konato (la)	
V Neologisma glosaro	
D Nia originala prozo	
D Nesenditaj leteroj el Japanio	
P Ni devas vivi	
R Nigra Magio	
Ni kaj ĝi	
I Ni ludas	
T Ni ludas teatraĵon	
Rg Nobla korano (la)	
R Nokta flugo	
R Nokta flugo	
P Norda naturo	
N Norda odiseado	
N Normandaj rakontoj	
V Nos premiers pas en Esperanto	
V Nouveau cours rationnel complet	
V Nouveau cours d'Esperanto	
Fz Nova realismo	
Rg Nova testamento (la)	
N Noveloj de Lusin	
P Nuancoj	
B Nudpieda Gen	
--	
P Obsedo	
T Oktavia	
P Omaĝoj	
R Ombro sur interna pejzaĝo	
R Oranĝa ombrelo	
D Originala romanaro en E°	
--	
E Panoramo de Esperanta literaturo	
P Panoramo el subaj fontoj	
I Papilia fonto	

U.F.E.	34,00
U.F.E.	24,00
Varankin	77,00
Cina E° E°	11,00
Waringhien	100,00
John Francis	72,00
Ferenz	57,00
Krtaliĉ	175,00
S.E.C.	27,00
Kalocsay	36,00
Chun chan yeh	49,00
I. Nemere	51,00
Fisker	23,00
Montherlant	60,00
Ady	21,00
Piĉ	155,00
Moirand	63,00
--	
Mac Gild	83,00
Artur E. Iltis	25,00
Boatman	20,00
Vatrè	60,00
Apolloner	11,00
Stimec	40,00
Walraamoen	28,00
Dorual	85,00
Waringhien	135,00
Gudrun Riisberg	14,00
Tvarozek	20,00
198,00	
Saint-Exupéry	24,00
	70,00
Hilda Dreson	27,00
London-De Diego	44,00
Maupassant	54,00
Ribot	15,00
S.A.T.	55,00
Ludwig-Triolle	65,00
Bruno Vogelmann	81,00
22,00	
Lusin	48,00
Soczurek	40,00
Nakazawa Keizi	90,00
--	
Piĉ	72,00
Seneca	30,00
Auld	44,00
Sponenka Stimec	74,00
C.E.E.	15,00
De Bonaero	14,00
--	
Givoje	41,00
Urbanova	30,00
C.E.E.	10,00

## La Aventuroj de Kajĉjo

*Kiu estus imaginta al si, ke eta cikoni-  
ido kapablintus ŝovi sin tiom intime en la  
ĉiutagan vivon de ordinara kamparanoj?*

*Jen petolema kaj impertinenta, jen pen-  
sema kaj eĉ helpema, Kajĉjo invitas nin  
partopreni -cikoni-maniere!- sian ĉiutagan  
vivon en pola farmobieno...*

Verkis pollingve Maria KOWNACKA  
Tradukis esperantlingven Maria SITNIK  
Ilustris Pol DENIS  
kaj eldonis le "GROUPE ESPERANTO-MEUSE"

86 paĝoj el glacea papero  
Akvarelo sur la frontpaĝo

Unu ekzemplero

70 FF



R Fianĉo de l'sorto	Rosbach	85,00
P Floroj de l'malbono (la)	Baudelaire	180,00
P Flugilhava ŝtono	Jiri-Karen	37,00
E Franca antologio (3 volumoj)	U.F.E.	360,00
Rg Francisko el Asizo	Doornik	59,00
P Frithjof-Sagao	Tegner	117,00
E Fundamento de Esperanto	Zamenhof	45,00
E Fundamento de Esperanto (10 eld.)	Zamenhof	82,00
--		
V Gaja leganto	Schwerin	14,00
P Gardu la pacon	Grigorov	26,00
T Gastejestrino (la)	Goldoni	54,00
S Geologio internacia + sup.	S.E.C.	27,00
T Georgo Dandin	Molière	24,00
R Gerda malaperis	Piron	19,00
D Germana antologio	Opo	92,00
V Grammaire ABC d'Esperanto	Vleming-Damme	160,00
V Grammaire et Esperanto	Lentaigne	5,00
V Grand dictionnaire E°-Français	Waringhien	80,00
N Gardeno de l'urbestro	Gabrielli	37,00
D Gemelaj steloj (la)	Miyazawa	33,00
--		
T Hamleto	Shakespeare	26,00
N Hieraù, hodiaù, morgaŭ	Bernard Golden	38,00
E Historio de Esperanto	Beckmann	9,00
I Hund-bazaro	Opo	30,00
D Hungara antologio	Corvina kiado	171,00



T Ifigenio en Taŭrido	-*-	Goethe	63,00
R Ili kaptis Elzan		Valano	22,00
Rg Imitado de Kristo (la)		Hemerken	16,00
P Imperio de l'koroj		Julius Babin	88,00
P Infana raso (la)		Auld	49,00
R Infanoj en torento		Stellan Engholm	30,00
N Inferio		Bulthuis	70,00
T Infero (la)		Dante	126,00
D Instrua amuzo		Marček Markovič	15,00
R Insulo de revoj		Manjo Austin	81,00
S Internacia kulrilibro			40,00
E Internacia lingvo en Eklezio kaj mondo		Korythowski	66,00
D Internacie kuiri		Becker	99,00
D Interparolo		A. Beolco	46,00
D Islama respubliko (la)		Fabry	18,00
D Itala antologio (XIII-XIX)		Azzi	130,00
P Izolo		Kalocsay	49,00
	-*-		
R Jaŭto veturas for... kaj veturigas la morton		Dorval	46,00
Bi Janusz Korczak		Szlazakowa	49,00
Rg Je la flanko de la profeto		Chiussi	99,00
D Jihetvar-movado			6,00
T Jozefo		Applebaum	24,00
V Junulkurso		S.A.T.	35,00
V Junulkurso-suplemento		S.A.T.	7,00
R Junuloj en torento		Stellan	33,00
T Justuloj (la)		Camus	21,00
	-*-		
E Kaj la ceter'-nur literaturo		Waringhien	118,00
P Kalevala		Lönnrot	240,00
R Kanako el Kananam		Linton	32,00
D Kanto super lulilo		Opo	5,00
Rg Kanto de kantoj		Cherpillot	60,00
R Kanto de juneco		Yangmo	31,00
D Kantokolekto		B.E.A.	17,00
D Kapao (la)		Akutagawa	21,00
R Kara diablino		Boatman	36,00
N Karnavalo		Gabrielli	24,00
R Karuseloj		Larbar	38,00
Bi Kaŝita vivo de Zamenhof (la)		Maimon	140,00
Rg Katolika preĝaro		I.K.U.E.	10,00
N Kaŭkazaj rakontoj		Lermontov	15,00
N Kaverno apud la maro		Potts	81,00
R Kazinski venas tro malfrue		Dorval	68,00
R Kiel akvo de l'rivero		Schwartz	165,00
V Kiel diri ?		Lentaing	25,00
E Kiel verki kaj traduki poemoj		Kalocsay	10,00
P Kien la poezio ?		Clark	32,00
R Klaĉejo		Piĉ	153,00
R Kit vivas		Lyngbirk	45,00
P Klasika periodo (la)		Waringhien	72,00

N Koko krias jam		Szilagi	41,00
V Komerca terminaro		I.K.E.F.	70,00
P Komuna kantareto		Opo	2,00
D Konsultlibro pri esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj		Gjivoje	37,00
G Kon-tiki ekspedicio			20,00
R Krado-mondo		Encarnacion	135,00
R Kromosomoj		Lorjak	35,00
E Kulturo kaj internacia lingvo		Auld	62,00
R Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo		Sekelj	27,00
D Kun siaspeca spico		Schwartz	86,00
G Kvardek vidindaj lokoj en Cinio		C.E.E.	27,00
P Kvaropo - poemoj - Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti			144,00
	-*-		
E Langue internationale du Docteur Zamenhof (la)		Gueguen	66,00
R Lasu min paroli plu		Piron	46,00
V Legu kaj ridu		Schmidt	9,00
P Lenora		Bürger	14,00
R Lenz		Haupenthal	18,00
V Lexique fundamental		Leger	20,00
P Libro de adoro (la)		Mattos	20,00
Pz Libro de la amo (la)		Follereau	37,00
P Libro de Nejma		Mattos	20,00
R Libro de romanoj		Benczik	45,00
E Lingvaj anguloj		F. Baronnet	10,00
E Lingvaj aspektoj		Migliorini	68,00
E Lingva esenco de esperanto (la)		Atanas	81,00
V Lingvaj respondoj		Zamenhof	24,00
V Lingvistikaj aspektoj de Esperanto		J. Wells	45,00
E Logika bazo de vortfarado en E°		De Saussure	13,00
I Longnazulo (la)		Hauff	27,00
R Loulan		Yasushi	76,00
N Lukio aŭ azeno		Lukiano-Beverling	20,00
P Lumo de orienta Eŭropo		Beekman	10,00
P Luzidoj (la)		Camoes	138,00
N Maja klubo		Julian Modest	16,00
R Maja pluvo		Julian Modest	16,00
F Magia ŝipo		C.E.E.	10,00
D Makedona antologio		Prilep	45,00
F Maks kaj Moritz		Bush	20,00
D Maksimoj de La Rochefoucauld		Waringhien	43,00
P Malmalice		Valano	27,00
N Malriĉaj homoj		Zsigmond Moricz	8,00
D Manifesto de la sennaciistoj		Lanti	6,00
D Manlibro pri ĵurnalismo		Junger-Maul	41,00
D Mannjoo-ŝun			33,00
D Mapo de la ĉina popola respubliko		C.E.E.	10,00
R Marta		Orzesko	30,00
N Martin Fievio		José Hernandez	72,00
R Materada		Fulvio-Tomiza	72,00
P Memkritiko		Sadler	18,00
P Merlo sur menhiro		Goodhair	45,00
V Metodo 10		U.F.E.	24,00

## Kasedoj

La ĉi-malsupraj kasedoj estas kopioj de diversaj prelegoj, konferencoj, muzikaĵoj, kiuj rilatas al Esperanto. La kvalito de la registradoj, plej ofte neprofesiaj, dependas kompreneble de la originalaĵo. Jen listo de proponitaj registraĵoj:

- 1) Journée d'étude sur l'Espéranto, 25.11.83 Université Paris VIII Vincennes à Saint-Denis. Kasedoj 2x90 mn.
- 2) "Kial ne la Angla?" -lingvaj malavantaĝoj de la angla. Prelego de Doktoro John C.Wells en Pompidou-centro, 8.2.87. Kasedo: 1x90 mn.
- 3) Elsendo de France-Inter de la 27.9.87 unua-flanke. Dua-flanke: Radio Bleue intervjuas Henri Masson: 30 mn. Radio-France Nancy intervjuas J.P. Colnot: 10 mn. Kasedo: 1x90 mn.
- 4) Esperanto-kurso de France Inter en aŭgusto 1988. Brigitte Vincent lernas Esperanton laŭ la instruado de Richard Comerford. Kasedoj 3x90 mn.
- 5) Kantoj por infanoj. Unua flanko: Kantu Esperante: kun Janico kaj Johano 12 konversaciaj kantoj (San Diego, Usono). El Zagreba kurso: Ne Monon sed Amon. Senlaborulo. Vivu la Stel'. Dua flanko: Kantoj registrataj en Hungario dum Esperanto-familia renkontiĝo en 1988. Kasedo: 1x60 mn.
- 6) "La danĝera lingvo" Prelego de Ulrich Linz registrata okaze de la staĝo en Homburg en decembre 1989. Kasedoj: 3x90 mn.
- 7) Radio Dreieckland (tri-landa regiono) intervjuas pri Esperanto s-rojn Kueny, Grossmann kaj Panchaud en la elsendo "A coup de bec". 15.4.90. Kasedo: 1x90 mn.
- 8) "Kial tiom da kontraŭstaroj al Esperanto en la ĝenerala publiko". Prelego de s-ro Piron en Esperanto, unua-flanke. Dua-flanke: Prelego de s-ro Piron en la franca pri Esperanto kaj la enkonduko en la lernejojn. Kasedo: 1x90 mn.
- 9) Radio Florival intervjuas s-rojn Ludwig kaj Kueny pri Esperanto en la alzaca dialekto en februaro 1990. Kasedo: 1x60 mn.
- 10) "Apprentissage des langues et Esperanto" par Dennis Edward Keefe Illinois, Etats-Unis. Pédagogue, professeur d'anglais, polyglotte. 24.2.90 au Grand Palais. En français. Kasedo: 1x60 mn.
- 11) Distra vespero kun Nikolin' okaze de federacia staĝo en Thionville 6.10.90. 60 mn. Prelego de Ivo Lapenna en Graz okaze de la Internacia Konferenco en julio 1987. 30 mn. Kasedo: 1x90
- 12) "Kiel ambasadori pri Esperanto" Prelego de Spomenka Štimek registrata okaze de la federacia staĝo en Illzach en junio 1991. Kasedoj: 2x90 mn.
- 13) Esploro de "Baza legolisto" de la Originala Esperanto-Literaturo. Prelego de Eddy Borsboom registrata okaze de la federacia staĝo en Villers-les-Nancy en marto 1992. Kasedoj: 2x90 mn.
- 14) "Les chemins de la connaissance," France Culture fait le point sur l'Espéranto avec Cécile Descubes, journaliste, et cinq invités. Du 13.4.92 au 17.4.92. Kasedo: 1x90 mn.
- 15) Europa Esperanto Kongreso en Verona junio 1992: Solena Malfermo. Ĝenerala asembleo de EEU. Fermo de la kongreso. Kasedoj: 2x90 mn.
- 16/ "Voĉo de D-r° Zamenhof" - raraĵo - speciala elsendo de Radio-Varsovio - kun akompananta teksto. Kasedo: 1x60 mn.

Kostoj de la kasedoj afrankitaj:	90-minuta kasedo	23 FF
	60-minuta kasedo	20 FF

Vi povas mendi la kasedojn per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:  
**FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PÔK 1997 72W NANCY**  
 Aŭ rekte per bankĉeko al mia adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées,  
 68390 BALDERSHEIM, Francio



Al ĉiuj E°-klubo en- kaj eksterlandaj:  
 Jen elstara spektaklo por viaj "vesperoj"...

Sporto, danco, ĉarmo, daŭra defio al ekvilibro... La Rulsketilo-Klubo de HETTANGE rikoltas sukcesojn sur multaj scenejoj naciaj kaj internaciaj. Ĝian lastan festparadon kvalifikis faka ĵurnalisto "olimpia prezentaĵo"!

Kontaktu: Catherine GALLEG0, 49 Rue du Gl de Gaulle  
 F-57330 HETTANGE-GRANDE



# distra angelo



## KRUCVORT-ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

## HORIZONTALE

1 malinklino al kunvivado inter homoj. 2 apartenanta al eminentaro - nedifina adjektivo - presocentro - sufikso. 3 ĉefadministri ŝtaton - semajntage. 4 parto de morala filozofio - nedifina adjektivo. 5 rilata al japana poezio - almeti ion por ŝirmi - elirigi korpan likvaĵon(r). 6 administra regularo. 7 elektra unuo - poezio - cerba protektilo(r). 8 flaveverda mineralo. 9 senindulge severa - rilata al rapida muzikkomponaĵo. 10 periodo de terciara epoko - maroko(r). 11 malgrasa - radono(r). 12 scienco pri popoloj el Oriento.

**VERTIKALE** 1 desinfektilo. 2 sufikso - parto de matematiko - instrumentaro(r). 3 rompita linio plurangula - instigi, persvadi - parto de gitaro. 4 iom da atmosfero - nedifina pronomo - fiŝo - prefikso. 5 surmara irado - esperanta litero - sufikso. 6 senfleksia pronomo - parto de aŭtomobilo - kemia substanco(r). 7 saltanta besteto - ĝenerale afliktita de skuetoj. 8 rango de religia pastraro - rilata al kruela imperiestro. 9 diagnoze frapeti korpoparton(r) - religia bildo(r). 10 literatura verko - parto de radaro - instrumentaro - verba finaĵo. 11 ne plu rezisti - sufikso - longa detala noto pri iu temo(r). 12 scienco pri la maroj.

## "SILAB"-ENIGMO

Pere de la ĉi-subaj ordigitaj vort-eroj, malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ago an ar ar ap aso ci ci de di eco er et ev feo fi gi ig ik in ino izo ko ko la laj lan le lek lo mo mo mor na na ne no of ol omo ono or oso ri ro sa se ta ti ti tru ui ulo ve vi

1	+ - - + -	dio de l' amo
2	+ - - + - - -	elekti por plibonigi
3	+ - - + -	devigi akceptigi ion al iu
4	+ - - + -	delikata odoro
5	+ - - + - - -	sumo periode pagata
6	+ - - + -	ne respektable viro
7	+ - - + - - -	elstarajo de ostoj
8	+ - - + - - -	aromataĵo
9	+ - - + -	sekseco
10	+ - - + - - -	malvigligi
11	+ - - + - - -	iompostioe disvolviĝi
12	+ - - + - - -	glata papero
13	+ - - + -	parto de alta domo
14	+ - - + - - -	antikva estro de ĥoro
15	+ - - + -	religia bildo
16	+ - - + - - -	imitendaĵo
17	+ - - + -	akvobirdo
18	+ - - + -	malrapida
19	+ - - + - - -	ĵuntaĵo inter du ostoj
20	+ - - + -	preme malĝojiga
21	+ - - + - - -	punkto de ekevoluo
22	+ - - + - - -	parencino



La Brita Esperantisto, jullet-aout 89 :  
"Il se prepare pour 1993"

## SOLVOJ de la lastaj enigmoj (n°78)

**silabenigmo:** "homo ne estas el ligno sed el karno". (spite al foresto -nevolat!- de la necesaj vort-eroj... du legantoj malkovris la kaŝitan proverbon! Gratulojn al ili!)

**krucvortenigmo:** supozitorioj precie sep em bu escept rembur kola ami pesi trinomo paco ro rok ksm rind obi gratul lui sakraĵa muzik klo ako tibio oka fola orni polikliniko ontologi kod